

一番大切な人

La Plej Amata Karulo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

この話は、釈尊がシュラヴァステイ
ー（舎衛城）の祇園精舎におられた時
のことです。

祇園精舎というのは、インドのコー
サラ国につくられた修行道場です。当
時、コーサラ国を治めていたのはパセ
ーナディという王で、夫人のマッリカ
ー王妃は仏教に深く帰依してしまし
た。

ある日のこと、パセーナディ王はマ
ッリカー妃と一緒に宮殿のテラスから
夕暮れの景色を楽しんでいました。ロ
マンチックな気分になった王は夫人に
尋ねました。

「マッリカー、そなたにとって一番
大切なのは誰だ？」

「もちろん、私自身に決まっていま
すわ。」

「なんと！そなたにとって、夫であ
るこの私よりも自分の方が大切だと申
すのか！けしからぬ奴だ。」

「あなた、落ち着いてください。そ
れではお尋ねしますが、あなたにとっ
ても一番大切なのは誰ですか？あなた
ご自身ではありませんか？」

「うむ・・・」

Kiam Ŝakja-munio estis en Ĵetavana
en Savatthi (Ŝravasti), okazis ĉi tiel:

Ĵetavana estas la ekzercejo, kiu estis
konstruita en Ŝravasti, la ĉefurbo de la
regno Kosala. Tiutempe la regnon
regis la reĝo Pasenadi, kaj lia edzino,
reĝino Mallika, profunde rifuĝis al
budhismo.

Iun tagon, Pasenadi kune kun
Mallika havis plezuron rigardi belan
pejzaĝon de vespera krepusko el la
teraso de la palaco. Tiam, la reĝo
estante sentimentala demandis la
reĝinon.

“Mallika, mia kara, kiu estas la plej
kara por vi?”

“Estas kompreneble. Mi mem.”

“Kio? Ĉu vi diras, ke vi estas pli
kara por vi ol mi, la reĝo? Vi estas
impertinenta!”

“Mia kara, bonvolu esti trankvila.
Nu, ankaŭ mi demandas, kiu estas la
plej kara por vi? Ĉu ne estas vi mem?”

“Fakte, sed...”

パセーナディ王は（いや、ワシは国王だし夫だしな。妻が夫を自分より大切に思うのは当然じゃないか）と内心思いましたが、普段から弁舌では妃の方がいちまい上手なので、何も言い返すことができませんでした。

しかしどうしても納得できない王は、次の日、祇園精舎に出かけ、釈尊に面会を申し出ました。

釈尊は王から事情を聞くと、深くうなづかれました。

「なるほど。お妃はものごとの本質をよくわかってらっしゃいます。王様、思い違いをなさらないでください。あなたにとっても、自分自身よりもっと愛しいと思う者はいないでしょう？誰にとってもそうなのです。だからこそ、自分を愛しく大切に思うならば、決して他の人を害してはなりません。自分を大切になさい。そうしてお妃を、そして国の人々、生きとし生けるものすべてを大切になさい。」

これより後、国王夫妻は仲よく暮らしました。

La reĝo Pasenadi pensis en sia koro: sed mi estas la reĝo kaj edzo. Edzino devas ami sian edzon pli kara ol sin mem. Sed kutime la reĝino estas pli lerta, se temas pri retoriko. Tial la reĝo ne povis repliki ŝin.

La sekvan tagon, la reĝo, kiu tamen ne estis konvinkita kaj kontenta, iris al Ĵetavana por demandi Ŝakja-munion.

Ŝakja-munio aŭskultis de la reĝo la aferon kaj kapjesis el sia koro.

“Tre bone. Ŝia reĝina moŝto bone komprenas la esencon. Via reĝa moŝto, ne trompu vin mem. Ankaŭ por vi, neniu estas pli kara ol vi mem, ĉu ne? Por ĉiu estas tiel same. Ĝuste tial, se vi amas vin karan, neniam damaĝu aliajn homojn. Amu vin mem, amu vian edzinon, la popolon de via regno, kaj finfine ĉiujn viv-estaĵojn.”

Post tio ĉi la paro de la reĝo kaj la reĝino vivis harmonie.

この話は、パーリ聖典の『相応部（サンユッタ・ニカーヤ）』3-8「マツリカー経」に

「心によってどこに行こうとも、自己より愛しいものを得ず。このように自己は他者にとっても愛しい。それゆえ自己を愛するものは 他者を害するなかれ」とあるのを基に、私がアレンジしましたので、必ずしも史実を反映していません。